“Ho”, diros iu Esperantisto, “tion kaŭzis la fakto, ke la angla kaj franca lingvoj ne havas tian formon, ĉar ili estas malpli esprimkapablaj ol Esperanto.” Bone, kara amiko, jen interesa argumento, sed traduko de oficiala termino ne estas taŭga okazo por demonstracii, ke en Esperanto vi povas diri ion, kion vi ne povas diri en nacia lingvo. Cetere en rusa lingvo oni povus traduki la esprimon *Unuiĝintaj Nacioj* per *Objedinjavšiesia Nacii*. La oficialaj tradukistoj prave kaj saĝe ne tradukis tiel.

“Tamen”, iu respondos, “la ideo esprimita en la termino *Unuiĝintaj Nacioj* estas pli bela kaj pli logika, ĉar ĝi indikas, ke la nacioj mem, per propra volo, iniciato kaj decido, unuiĝis. Aliflanke la termino *Unuigitaj Nacioj* ŝajnas diri, ke la nacioj estas unuigitaj per iu ekstera influo. Unu formo estas aktiva, la alia pasiva.”

Jes, tiu argumento estas interesa, mi diras denove. Sed, tradukante oficialan terminon en Esperanton, vi ne havas la rajton esprimi vian propran ideon aŭ eĉ la ideon de la fondintoj de UNO; via sola tasko estas liveri korektan tradukon. Cetere de la pure logika vidpunkto oni povas kritiki la terminon *Unuiĝintaj Nacioj*. Ĉu la nacioj vere “iĝis unu”? Ili ankoraŭ estas multaj, ĉu ne? Unu el la ĉefaj kaŭzoj de la nesufiĉa sukceso de UNO estas la fakto, ke la popoloj mem ne montris sufiĉe da intereso pri UNO, sed lasas la UNO-laboron al kelkaj membroj de siaj registaroj.

UNESCO estas mallongigo de la anglalingva nomo de la Organizo de la Unuigitaj Nacioj por Eduko, Scienco kaj Kulturo (*United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization*). La mallongigo tute ne korespondas al la titolo en aliaj oficialaj lingvoj de UNESCO. La franca

titolo, ekzemple, estas *Organisation des Nations Unies pour l'Education, la Science et la Culture*. Kompreneble oni elparolas la vorton UNESCO iom malsame. Angle oni diras *juneskoŭ*, france *inesko*, hispane *unesko*, sed oni ĉiam skribas UNESCO. Oni do devas skribi UNESCO ankaŭ en Esperanto. La elparolo ne estas grava, ĉar la vorto estas uzata skribe pli ofte ol buŝe; tamen oni povas facile klarigi en artikoloj kaj paroladoj ke la preferinda elparolo estas *unesko*.

Sed kelkaj Esperantistoj decidis, ke estus pli bone skribi UNESCO, kaj ili eĉ elpensis Esperanto-nomojn, kies komencliteroj povus esti legatataj UNESCO, ekz. *Unuiĝint-Naciara Eduka, Sciencia, Kultura Organizo*. Laŭ mia opinio tiu termino estas barbara kaj nenecesa, ĉar oni ja ĝenerale scias, ke UNESCO estas mallongigo de angla titolo. Oni ne klopodas trovi klarigon por franca, hispana aŭ alia lingvo; kial do por Esperanto?

Kelkaj Esperantistoj eĉ komencis uzi la vorton, kvazaŭ ĝi enhavus Esperanto-radikon *unesk-*, kaj aldonas diversajn gramatikajn finaĵojn kaj sufiksojn, ekz. *uneska, uneskece, uneskema*. Mi ricevis unu leteron, kiu parolas pri "unesk-komisiona dokumento". Tiaj esprimoj ŝajnas al mi malaprobindaj kaj danĝeraj, ĉar ili ridindigas la Esperanto-movadon en la okuloj de eksterstarantaj personoj.

La Centro de Esploroj kaj Dokumentado (CED) de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu estas unu el la kulpuloj pri *Unuiĝintaj Nacioj* kaj *UNESKO*, en cirkulero pri la UNESCO-Konferenco en Paris ankaŭ uzis la strangan mallongigon OUN (por *Organizo de Unuiĝintaj Nacioj*), insistante en speciala aldono pri la neceseco de "korekta traduko de teknikaj esprimoj". En mallonga listo de tiaj esprimoj CED diris, ke OUN estas france *Organisation des Nations Unies*, angle *United Nations Organisation*. Tio estas misinformo. La oficialaj nomoj estas *Nations Unies* kaj *United Nations*, kaj la Informa Fako de UNo kondukis longan kaj persistan batalon kontraŭ la uzo de la nekorektaj terminoj supre menciitaj.

Alia terminologia problemo iomete urĝa en la nuna momento estas la demando, ĉu oni uzu la vorton *Sekretariejo* aŭ *Sekretariaro* por la organo, kiun la UNo-Konstitucio nomas angle *Secretariat*, france *Secretariat*, hispane *Secretaria*, ruse *Sekretariat*. En tiuj lingvoj la termino signifas samtempe la organon mem, ĝian estron, ĝian oficistaron kaj ĝian ejon. La problemo de taŭga Esperanto-traduko estas malfacila ĉar Esperanto emas esti pli preciza ol la naciaj lingvoj; *-aro* estas grupo da personoj aŭ aĵoj, *-ejo* estas loko.

La termino *Sekretariaro* donas la impreson, ke ĝi konsistas el pluraj sekretarioj pli aŭ malpli samrangaj, kiel prezidantaro konsistas el diversaj prezidantoj, ne el unu prezidanto kaj liaj helpantoj kaj oficistoj. La sekretaria organo de UNo konsistas el unu Ĝenerala Sekretario (nur unu!) kaj el oficistoj, kiujn li dungas (kaj povas maldungi) laŭplaĉe. En multaj kazoj la angla termino *Secretariat* havas la saman juran signifon kiel Ĝenerala Sekretario. En tia kazo sendube la Esperanto-vorto *Sekretariaro* ne taŭgas.

Aliflanke laŭ la reguloj de analoga uzo la vorto *Sekretariejo* povas signifi ne nur la ejon, sed ankaŭ la institucion. Oni diras, ke la centra oficejo de organizo faras aŭ skribas ion, ke lernejo publikigas gazeton, ke juĝejo aŭ malliberejo faras regulojn. Kompreneble ejo ne povas fari, skribi aŭ publikigi ion; nur la personoj, kiuj estras la ejon aŭ laboras en

ĝi, povas fari tion. En preskaŭ ĉiuj naciaj lingvoj oni parolas pri la "domoj" aŭ ĉambroj de parlamento kaj uzas la samajn vortojn por preĝejo kaj eklezio, juĝejo kaj juĝistaro. Tial ŝajnas al mi tute permeseble uzi la terminon *Sekretariejo*, kiam oni parolas pri la institucio kaj samtempe pri ĝia estro, oficistaro kaj ejo.

Tamen mi emas pensi, ke tiu uzo de *Sekretariejo* ne estas tute kontentiga kaj ke eble en estonta tempo oni konkludos, ke estos dezirinde enkonduki neologismon *Sekretariato* kun la pli vasta senco. En similaj kazoj ja ekzistas *direkcio* kaj *redakcio*, kiujn oni uzas, kiam *direktisto*, *direktoraro*, *direktejo*, *redaktisto*, *redaktanto*, *redaktoro*, *redaktistaro*, *redaktado*, *redaktejo* estas tro precizaj. Mi hezitas proponi neologismon, sed mi opinias, ke la problemo meritas la seriozan studon de fakuloj.

Tute alian problemon prezentas la vorto *Carto*, kiun S-ro Harry uzas en la traduko de *La Carto de la Unuiĝintaj Nacioj*. En la "Lingvaj Notoj" aldonitaj al la traduko S-ro Harry diras, ke li malpreferas mian tradukon *Konstitucio*. La problemo havas diversajn aspektojn, kaj mi havas kelkajn dubojn pri la afero. Unue oni povus diri, ke *konstitucio* estas oficiala vorto dum *ĉarto* estas neologismo. Due estas fakto, ke *Carto* estas simila al la vorto uzata en angla, franca kaj hispana lingvoj. Trie estas grave konsideri la problemon el pli vasta perspektivo.

En naciaj lingvoj la bazaj leĝoj de internaciaj organizoj havas multajn diversajn nomojn. Angle ekzistas *Charter* de UNO, *Statute* de la Internacia Tribunalo, *Constitution* de UNESCO, *Convention* de la Internacia Civil-Aviada Organizo (ICAO), *Articles of Agreement* de la Internacia Banko; ekzistis *Covenant* de la Ligo de Nacioj. Ĉu en Esperanto ni imitu tiun variecon de terminoj, kiuj havas la saman esencan signifon? En nia lingvo jam ekzistas la solena vorto *konstitucio* kaj malpli solenaj vortoj *statuto*, *regularo*, *interkonsento*. Eble tiuj vortoj sufiĉas, eble ne. Mi hezitas proponi solvon, sed mi prezentas la demandon.

Vizitantoj el Japanujo al la Centra Oficejo lastatempe estis: S-ro T. *Takabaŝi*, kiu instruas navigacion en marista lernejo en Hokkaido. Li kaptis okazon viziti nin dum lia ŝipo haltis en Nov-Jorko. Ankaŭ vizitis nin S-ro H. *Nakaŝima*, Vic-Prezidanto de Nacia Federacio de Malgrandaj Industriistoj. Li estis survoje hejmen post ĉeesto ĉe ILO-Konferenco en Svislando, kie li estis reprezentanto de sia registaro.

En la gazeto "Hi-Notes", organo de la Federacio de Muzikistoj aperis noto, ke S-ro *Sergio Docal*, direktisto de orkestro "Latin Band" en Washington, D. C., havas aktivan intereson pri Esperanto.

"Readers Round Table", dumonata gazeto, eldonita en Chatham, N. J., publikigis kvar-paĝan artikolon pri Esperanto. La artikolo, titolita "Faligu la Babel-Turon", estis skribita de F-ino *Elsie Yunghans*.

La konata radio-programo "Meet Your Match" (Renkontu Vian Egalulon) intervjuis S-ino *Doris T. Connor* la 6-an de Decembro. S-ino Connor havis oportunon paroli pri Esperanto kaj ankaŭ faris tri demandojn en Esperanto al la komediisto *Jan Murray*, ekzemple: Kion vi opinias pri la pasinta elekto?

TIEL ESTAS MALBONE – KAJ TIEL NE BONE

Simon Zemojda

ĈION kaŭzis ĉi tiu milito. La malfeliĉo okazis kiam la armeo devis iri ĝuste tra nia vilaĝo. Vi scias kiel estas dum milito. Ĉion oni detruas, ĉion bruligas. Pri kio kulpis nia ponto, mi ne scias. Tamen oni forbruligis ĝin.

La armeo rapide foriris malproksimen al okcidento. Post tri semajnoj alvenis novaĵo, ke la milito finiĝis. Dankon al Dio! Sed, ni restis sen ponto. Estas vere, ke la rivero ne estas granda, kaj ĝia akvo ne estas profunda. Sed kiu volas malsekigi siajn piedojn eĉ nur ĝis genuoj, precipe en aŭtuno. Veturiloj povis brave iri tra la vadejo, sed por iri piede estis malbone.

Baldaŭ post la milito oni sendis al ni komisaron, kiu komencis direkti postmilitajn ordonojn. Komisaro li estis, kiu post ĉiuj du frazoj aldonis: "Kiam mi estis en Kremlo kaj persone parolis kun kamarado Lenin..."

Inter diversaj aferoj li trovis la aferon de forbruligita ponto. Kion oni konsilis aŭ intencis, mi ne scias. Konsilanto mi ne estis. Tamen la ponton oni komencis konstrui, kaj tre rapide nova ponto estis preta. Sed jen eliris najlo. La budĝeto estis malplena, kaj por konstruaĵo oni devas pagi. Vere, la konstruligno estis senpaga, ĉar granda arbaro kiel muro ĉirkaŭas la vilaĝon. Laboro de laboristoj tiel same estis senpaga. Kvan-kam, la ponto estis konstruita, tamen socialismo ne estis finkonstruita, kaj la sovetrusa reĝimo bezonis pli da mono.

Pro tio la komisaro starigis min kiel gardiston kaj ordonis al mi preni monon de ĉevalveturiloj kaj piedirantoj. Li ordonis al mi fari honestan servon, imposton ankaŭ preni de ĉiuj konatoj. La servo estis facila. Mi staris sur la ponto de mateno ĝis vespero kaj enskribis miajn laborhorojn kiel en kolhozo. Kiam estis malvarme, aŭ kiam pluvigis mi kaŝis min en la gardbudon, kiun mi mem konstruis el pecoj de malnovaj tabuloj.

Bonvolu ne pensi, ke ĉio iris glate. Vi devas scii, ke oni ofte insultis min pro la tarifo, kaj eĉ ĵetis stonetojn sur mian kapon.

Do, finiĝis la unua monato de mia servo kaj mi kolektis entute dudek du rublojn. La rublo ne estas multe da mono, sed kiu volas pagi ĝin? El nia vilaĝo neniu volis doni eĉ kopekon por tiu socialista konstruaĵo. Kiam estis varme en somero, piedirantoj suprenvolvis la pantalonon kaj iris tra vadejo. La ŝuojn ili ne bezonis depreni, ĉar ili ne havis ilin. Ankaŭ ĉiu bona vilaĝano sciis, ke estus peko dum somero veturi tra la ponto, ĉar oni ja devas malsekigi la radojn de la veturilo.

Kelkfoje traveturis aŭtomobiloj, sed mi nenion faris pri ili, ĉar la komisaro diris al mi nenion pri aŭtomobiloj.

Unufoje de malproksime mi vidis, ke venas la komisaro. Malalta, dikventra li balanciĝis ambaŭflanken kiel anaso, kaj ŝovis sin sur la ponton. Malice li rigardis min, kaj nenion dirinte trapasis al la alia fino de la ponto.

"Vi estas komisaro," mi pensis, "klera



persono. Vi estis en Kremlo kaj kun kamarado Lenin persone parolis, kaj tamen kondukas kiel porko. La porko ne estas nobla besto, sed kiam ĝi vidas ne nur homon, sed eĉ alian porkon, ĝi gruntas en sia lingvo, diras 'Bonan tagon'. Kaj vi? Vi scias kaj eĉ ordonis al mi, ke trapaso kostas duonon de rublo."

Subite la komisaro komencis krii je mi, "Ĉu vi tiel servas?"

"Kion mi faris malbone?" mi pensis. "Nenion malbone."

"Kion mi ordonis al vi?" kriis li. "De veturiloj unu rublon kaj de piedirantoj duonan rublon preni! Ĉu jes?"

"Jes, kamarado komisaro." mi diris al li.

"Jes, sed ĉu vi prenas? Kial de mi vi ne prenis?"

"Kamarado komisaro, vi estas nia..."

"Kion signifas nia?" komisaro fortegis sian voĉon. "Ne estas niaj. Ĉu vi komprenas? Kiam mi estis en Kremlo kaj persone parolis kun kamarado Lenin, ĉiu pagis tion, kion soveto postulis."

"Sed vi estas komisaro de ni."

"Por vi ekzistas nenia komisaro, ĉu vi komprenas min?"

"Mi bone komprenas, sed kiel mi povas preni monon de vi? Vi ordonas al mi. Vi parolis kun kamarado Lenin..."

"Kiel stulta vi estas! Vi devas kompreni, ke vi estas en reĝima servo kaj ĉiu komisaro devas obei vin."

"Ĉu jes? Nun mi plene komprenas. Dankon, kamarado komisaro, ke vi bone instruis min."

"Ha! ho! do mi estas grava persono," pensis mi. "Do, nur Dio estas pli alta ol mi. Sed de vi, kamarado, mi prenos duoblan pagon. Vi devas reveni al la vilaĝo. Jes, ordonoj estas ordonoj, kaj oni devas plenumi ilin plene, komplete kaj senindulge!"

La dikventrulo esploris la ponton, tuŝis la fostojn, forŝiris floron ĉe la vojo kaj longe turnis ĝin en la fingroj. Poste li forjetis la floron, bruligis cigaron kaj turnis sin por reiri tra la ponto al la vilaĝo. Subite mi baris al li la vojon kriante, "Haltu! Bonvolu pagi duonrublon por trairi."

"Jes, jes, nun vi estas en ordo," diris la komisaro. "Ĉiam faru tiel. Neniu rajtas pasi senpage. Se iu ne havas monon pelu lin en la akvon."

Mi surpriziĝis. Fine, unuan fojon komisaro laŭdis min. Dume li serĉis en unu poŝo, en la dua... malplenaj!

"Ho," ridetis la komisaro, "la monujon mi lasis hejme. Aŭskultu, Ivano, ĉio estas en ordo. Vi estas bona gardisto, sed mi ne havas monon ĉe mi."

"Kio? Vi ne havas monon! Reiru! La trapaso kostas duonrublon. Tio estis ordono al mi."

"Ivano, komprenu, ke nun mi ne havas monon."

"Mi bone komprenas. Se vi volas trairi, vi devas pagi. Kaj de vi mi devas preni nun duoble, ĉar vi jam unufoje trairis la ponton. Se vi ne havas monon bonvolu iri tra la vadejo."

"Ivano, al kiu vi parolas? Mi estas komisaro!"

"Por mi vi nun estas nenia komisaro, sed tia sama homo kiel ĉiu alia. Mi estas en reĝima servo."

"Vi ne estu heroo. Mi diras al vi, ke mi estas komisaro!"

"Aŭskultu, kamarado. Nur antaŭ duonhoro vi mem diris, ke mi estas gardisto, kaj dum servo ekzistas nenia komisaro. Ne, vi ne kaptos min!"

"Ivano, ĉu vi ne konas min?"

"Kia demando! Mi konas ĉiujn en la vilaĝo. La konateco estas unu afero kaj servo la alia. Pagu aŭ uzu la vadejon!"

"Ivano, pro ĉi tio vi estos punita."

"Pro ĉi tio neniu havas rajton puni min. Mi estas gardisto kaj mi servas bone, precize laŭ viaj propraj instruoj."

"Ivano, vi malbone servas, ĉar vi ne obeas min."

"Kio? Mi malbone servas?"

"Mi estas komisaro."

"Kaj mi estas la gardisto. Dum mia servo ne ekzistas por mi ia ajn komisaro."

Nenio helpis al la komisaro, nek petoj, nek malbenoj, nek lia alta posteno. Li deprenis siajn ŝuojn kaj eniris la akvon.

"Ĉu estas kankroj en la rivero? Akvokirloj?" li timeme demandis.

"En riveroj estas ĉio. Estas kankroj, ranoj, akvokirloj. Estas fiŝoj, kiuj manĝas homojn. Sub la ponto estas akvo-ratoj. Kaj en ĉi tiu loko apud la fosto oni jam dufoje ĉijare elprenis dronintojn."

"Bone, bone, ni parolos morgaŭ en mia oficejo."

La sekvantan tagon mi ricevis skribaĵon: "Pro malbona servo kaj malobeemo vi perdas postenon kiel gardisto."

Kia justeco? Mi ne prenis imposton — estas nebone. Mi postulis imposton — estas ankaŭ malbone. Kion pri tio estus dirinta Lenin en Kremlo?

Ho, tian ordon ĉiuj fulmotondroj kaj hajlo mortigu!



La Esperanto-Societo de New Jersey nuntempe aktive laboras pri aranĝoj por novaj Esperanto-kursoj en diversaj Lernejoj por Plenkreskuloj. Kursoj estas anoncigitaj jene: tri en Newark, N. J., unu ĉe YMCA en Orange, N. J., kaj unu en Columbia, N. J.

"Mr. Information" (S-ro Informo), populara radio-programo de la okcidenta marborda regiono de Usono, donis kelkajn detalojn pri Esperanto en programo je la 9-a de Decembro. La nomo kaj adreso de EANA estis donita por informpetoj. Dankon ni ŝuldas al *Ted Stewart*, kiu instigis la mencion. S-ro Stewart faras la jenan proponon al ĉiuj Esperantistoj: "Kiam ajn vi trovos mencion pri Esperanto en radio aŭ en gazeto, tuj skribu poŝtkarton al tiu adreso (kvazaŭ vi ne estas Esperantisto), kaj faru demandojn kiel ekzemple, *Kie mi povas lerni Esperanton?*, *Cu vi povas doni al mi adreson de la Esperanto-organizo en Usono?*, ktp.

El Formoso ni ricevis lastatempe kelkajn leterojn de novaj Esperantistoj, kiuj ĵus komencis lerni Esperanton dank' al helpo ricevita de nia asocio EANA. La Centra Oficejo jam sendis donace pli ol 35 malgrandajn lernolibretojn al informpetantoj en Formoso. La rikolton ni nun ricevas per dankleteroj *Esperante* skribitaj!

Turistaj broŝuroj en Esperanto: Bela ilustrita prospekto pri la urbo Hamburg estas havebla senpage de *Fremdenverkehrsverein der Hansestadt Hamburg e.V.*, (24a) Hamburg, Germanujo. La internacia foiro de Padova publikigis belan ilustritan broŝuron nomatan "Padova kaj ĝia Foiro". Sendu petojn kaj gratul-leterojn al *Esperanto-Oficejo, Foiro de Padova, Via N. Tommaseo 59, Padova, Italujo.*



DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Ekvadoro.** Byron L. Eguigureno, Casilla N-ro 3240, Guayaquil. Blinda Esperantisto deziras korespondi. Oni povas skribi plume.
- Italujo.** Coute Francesco, Via la Muuziatina, Pisa. Deziras korespondi.
- Francujo.** Claude Salle, 6 rue Gambetta, Orleans (Loiret). 17-jara elektisto deziras korespondi kun junulino en Usono.
- Usono.** Jim Osburn, Box 415, Memphis State College, Memphis, Tenn. *Moroj kaj kutimoj rilate al la morto.* Studento deziras informon koncerne kutimojn pri la morto en ĉiuj landoj. B. v. skribi pri la sociaj, financaj kaj speciale kuriozaj kutimoj rilate al la morto, enterigo kaj funebro en via lando. Respondo garantiata.
- Japanujo.** Yotsugi Yazaki, Momonomoto-cho 16, Kyoto. Interŝ. PK & PM.
- Germanujo.** Ewald Wunschel, (22b) Leimersheim/Pfalz. 17-jara fervojista lernanto dez. kor. kun gesamideanoj, precipe knabinoj.

10% Discount on All Books to Members of EANA

Along with this issue of AE you are receiving the complete catalog of the *Esperanto Book Service of America*, official book service of EANA. The Central Office is pleased to announce that henceforth all members of EANA will enjoy 10% discount on ALL books and other items in the catalog purchased from Headquarters. Thus, when you order books in any amount just take 10% off the total sum due. Now is a good time to order those books you may be wanting. This offer of 10% discount will be valid until new catalog is issued, or until further notice. Take advantage of this special privilege to Members of EANA.

EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1953

The Association thanks you sincerely for your support during 1952 and requests that you send your 1953 dues soon. An early remittance would be very helpful and would avoid the extra office work of sending out reminders.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "Associate Membership" (AM) in the UEA. You receive the coupons of the UEA and have a right to the services of Delegates throughout the world.

In addition, there are "Individual Membership" categories in UEA: the *Yearbook* is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and the magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually. Here are Membership Rates for 1953:

EANA membership including UEA	Associate of UEA	Yearbook of UEA	Yearbook & Esperanto
Regular Active Member	\$5.00	\$6.25	\$8.00
Patron Member	10.00	11.25	13.00

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.

PRACTICAL ESPERANTO , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
REED'S PRACTICAL GRAMMAR , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
UNIVERSALA ESPERANTO-METODO , Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....	Cloth 6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 1.50
ESPERANTO (World Language Series) , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
WORLD'S CHIEF LANGUAGES , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....	Cloth 6.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY , Karl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp.....	.25
EDINBURGH DICTIONARY , Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....	Cloth .85
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
PLENA VORTARO DE ESPERANTO , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....	Cloth 4.00
<i>Rare</i> , exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....	Cloth 6.50
FUNDAMENTA KRESTOMATIO , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.65
Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards....	Half-Cloth 2.50
KARLO , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio) . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
ESPERANTO SORTIMENTO . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Argenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, & <i>Tbais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Rozujo Ciumljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS . Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
INDIAN BEAD STAR . Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
GREEN STAR PENDANT . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia....	.75
ENAMEL GREEN STAR . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of Doris Tappan Connor. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. NOW, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



- The complete "Connor Course" includes the following:
- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
 - (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
 - (3) A practical and easy-to-follow "Study Guide" (82 pp.)
 - (4) Personalized instruction and guidance of Mrs. Connor.
 - (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
 - (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
 - (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "Connor Course", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete master course at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order NOW:

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.